Alvoko por Internacia Asocio de la Liberpenso

La 4an de julio 2005 en Parizo, kadre de internacia kongreso de IHEU, la franca Federacio de la Liberpenso iniciatis tutmondan kongreson en kiu 250 ĉeestantoj el 29 landoj, debatis pri la necesa agado de la Liberpenso.

Veninte el ĉiuj kontinentoj, ili konjektis ke necesas kolektive finopunkti la disecon de la asocioj el diversaj landoj kiuj, tra la mondo, sin proklamas liberpensaj aŭ ateistaj.

Fakte, la nepre necesa batalo por la disigo de la religioj kaj de la Ŝtatoj, eĉ se formale nacia, havas nenegeblan karakteron internacian pro la politikaj kaj filozofaj principoj kiujn ĝi starigas.

La batalo por la triumfo de totala libereco de konscienco ne povas esti sen enkonstitucia postulo de plena kaj entuta disigo de la publika sfero kaj de la religioj. Tiu filozofa movado fontis el la jarcento de la Klerismo kiu montris la vojon al la mondo.

Dum pli ol du jarcentoj, la Disigo ekestis en Usono kaj etendiĝis al Meksikio, al Francio, al Sovetio, al Turkio kaj al pluraj aliaj landoj kiel en Hispanio en 1931. Tute ne malfortiĝante, malgraŭ multaj malfacilaĵoj, tiu historia movado de emancipo de la konsciencoj kaj de la popoloj plu etendiĝas. Freŝdate, viciĝis Nepalo kaj Bolivio en plenumo de tiu liberiga ago.

Inspirite de tiu ideo la 250 ĉeestantoj de la tutmonda Kongreso de la Liberpenso en 2005 proklamis la fondon de la Internacia Komitato de Kunligo de la Ateistoj kaj de la Liberpensuloj (CILALP).

De tiu dato, la CILALP komencis agi. Interŝanĝoj okazis, interalie per interreto. Dufoje la CILALP kunvenis la 4an de junio 2008 en Washington-DC, kaj en Londono la 7an de junio 2009.

Dufoje la diversaj ĉeestantoj konfirmis sian konsenton por ke estu decidita la bazo de fondado de nova Internacia Asocio de la Liberpenso. Ili decidis ke la plej trafaj momento kaj loko por tio estos sendube, la venonta internacia kongreso de la Internacia Humanista kaj Laika Unio (IHEU) en aŭgusto 2011, en Oslo en Norvegio.

Tial, sin apogante sur tiu denova mandato, la subskribantoj de tiu alvoko adresiĝas al ĉiuj samideaj asocioj tra la mondo por firme antaŭeniri al tiu celo.

La subskribantoj alvokas ilin por ke ili esprimu sian opinion pri la jenaj demandoj :

1- Ĉu vi estas interesataj de la Fondo de Internacia Asocio de la Liberpenso ?
2- Ĉu vi konsentas membriĝi al la Tutmonda Kongreso de la Liberpenso kiu ekfondos ĝin en aŭgusto 2011 en Norvegio ?
3- Ĉu vi deziras aktive partopreni la Komitaton de preparado de tiu tutmonda Kongreso ?
4- Ĉu vi volas esti regule informitaj pri la stato de la laboro ?

- Besson Philippe, Libre Pensée française
- Blondel Marc, Libre Pensée française,
- Boroiu Nicolae, Association pour l'Emancipation des Travailleurs de Roumanie
- Cloutier Bernard, Fondation Humaniste du Québec, Canada
- Delgado Francisco, Président d'Europa laica, Espagne
- Estrella T. Hugo, Président, Center for Inquiry – Italie, Humaniste - Argentine
- Eyschen Christian, Libre Pensée française
- Goeringer Conrad, American Atheists, USA.
- Gousseva Julia, Centre d'éducation et de recherches Praxis, Russie
- Hodgkinson Jean, libre penseur de Toronto, Ontario, Canada.
- Igwe Léo, Humaniste, Nigéria
- Johnson Ellen, Executive Director, Enlighten The Vote, USA
- Lafouge Jacques, Libre Pensée française
- Laxalte Terra Elbio, Libre Penseur, Uruguay
- Lepeix Roger, Libre Pensée française
- Liddle Terry, Freethought History Research Group, Grande-Bretagne.
- Mc Arthur Ed, Freethought History Research Group, Grande-Bretagne.
- Moll Shirley, Athée Minnesota, USA
- Ozon-Iancu, Association pour l'Emancipation des Travailleurs de Roumanie
- Petersen Steve, Athée Minnesota, USA
- Porteous Wood Keith, National Sécular Society, Grande-Bretagne.
- Riba Albert, Union des Athées et Libres Penseurs, Espagne
- Rivière Christian, Président de l'association mondiale athée d'Esperanto (ATEO)
- Robyn Johannés, Président de l'Union des Athées
- Sankari Nina, Pologne
- Thain Richard G.L, Libre Penseur, Humaniste Canada
- Tudor Marian, Association pour l'Emancipation des Travailleurs de Roumanie

El la franca tradukis Christian Rivière